

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ elokuu ♦ aŭgusto ♦ 4/2009



*Pori bonvenigas esperantistojn al la Aŭtunaj Tagoj de EAF. Informoj sur paĝoj 14-16.
– Sur la bildo imponas la urbodomo fotita lastjare dum la 450-jarfestado de la urbo.*

Arvo Karvinen prezidanto de LIBE, p. 12

10a Valamo-kurso p. 5 ♦ 50-jariĝinta BET, p. 8

Raporto kaj intervjuoj el KEF, p. 19 ♦ UK defiita de vandaloj, p. 22

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.

Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi

Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*

Vanha Hämeentie 64 as. 1, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 ✉ mmakita@utu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Fleminginkatu 12a A 16, 00530 Helsinki. ☎ 044 3933 924 ✉ ilkka.santtila@welho.com

Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhintaa/Prenumerationspris/Abonprezo: 22 e/vuosi/år/jaro

Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*

Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 ✉ esperarto@phnet.fi

Taneli Huuskonen, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 ✉ taneli@poczta.onet.pl

Paula Niinikorpi, Männistöntie 8 C 29, 28120 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ 050 327 8528 ✉ markku.saastamoinen@kotikone.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Arvo Karvinen, Piikintie 22 as 10, 00680 Helsinki. ☎ 040 502 3765 ✉ arvo.karvinen@elisanel.fi

Jukka Laaksonen, Orimuskatu 79 B 4, 33580 Tampere. ☎ (03) 2554 724 ✉ jvaletto@kolumbus.fi

Vilorg Teräväinen, Kaunisharjunpolku 3 E 61, 15800 Lahti. ☎ (03) 734 3978 ✉ vilorg@elmi.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): Sampo 800017-230825.

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)

Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Internet: <http://www.esperanto.fi>





Kiu estas Ingemar Stenmark, kio estas Alli?

Antaŭ tri jardekoj mi laboris en politeknika lernejo kiel instruisto pri tiel nomataj ĝeneralaj studobjektoj, ĉefe pri la finna kiel gepatara lingvo. Plej multaj kolegoj estis inĝenie-
roj kaj teknikistoj en tiu granda stabĉambro, kie paŭzojn pasigis la viroj. Oni parolis pri diversaj temoj, kaj mi partoprenis tiujn diskutojn pri kiu mi, la plej juna en tuta kolegio, ion komprenis.

Okazis ankaŭ, ke mi konversacian temon tute ne konis. Tiam aŭskultis por lerni. Foje mian atenton altiris nomo ofte menciata kaj menciita en la stabĉambra parolfluo. Mi tute ne sciis pri kiu temas, do ekinteresiĝis, fine intermetis demandon: ”Kiu do estas tiu Ingemar Stenmark?”

Ekestis situacio, kian mi antaŭe ne spertis, nur vidis aŭ legis kiel humuraĵon: Subite kaj komplete eksilentigis, ĉies mirplena rigardo direktigis al mi, buŝoj malfermaj, okuloj rondaj. La tuta kolegio estis kvazaŭ demandosigno. Kiel povas ekzisti homo ne scianta, kiu estas Ingemar Stenmark?

Mi fakte ne ŝercis, sed efektive ne rekonis, ke temis pri la tiam (kaj ĝis nun) plej granda ĉampiono en slalomo. Stenmark (n. 1956) furoris en Finnlando samkiel hejme en Svedio, li estis absoluta sportheroo. Lin konis, almenaŭ laŭnome, eĉ ”laikoj” sen granda sportentuziasmo.

Alia konstato de absoluta nescio (unu el multaj!) temis pri ”allit”, ”Alli” kaj ”Paasikivi”. En leĝerstila gazeta kolumno, ”babilaĵo”, ĵurnalistino skribis pri ”allit”: ”Nuoretkin tietävät, mitä ovat allit, vaikka eivät Paasikivestä mitään perustaisi.” (”Ankaŭ junularo konas ‘allit’, kvankam ne rekonus la nomon Paasikivi.”)

Nu, mi ne konis, kaj ekesploris. Juho Kusti Paasikivi (1870–1957, ĝis 1887, atentu la jaron, Johan Gustaf Hellsten) estis centra figuro de la finna ekonomio kaj politiko dum pli ol kvindek jaroj, respublika prezidento 1946–1956, arkitekto de la nova eksterlanda politiko, per kiu la lando perdinta militon gajnis pacon. Lia dua edzino (li vidviĝis en 1931) estis Allina Amanda, ”Alli”, nask. Valve, ĝis 1907 Hildén (1879–1960). Tion mi sciis. Sed kion signifas la finna (kaj verŝajne ankaŭ finnlandsveda) vorto ”allit”? Mi konis nur la signifon de anaseca birdo, klangulo, finne ”alli”. Sed ne temis pri ĝi. Jen:

SinJORINO Alli Paasikivi certe ne estis pli vanta ol ni mezume, sed ja ŝi volis aperi en publikigitaj fotoj plejeble bonaspekta. Tiujn fotojn ja vidis la tuta popolo en gazetoj. Ŝi ŝatis somere senmanikajn robojn. Problemo estis, ke en la brakoj de la iom ronda sinJORINO estis rimark-ebla pendaĵo. Laŭ deziro esprimita – ne necese de ŝi mem – iuj gazetoj diskrete retuŝ-metode forigis la ĝenajn troaĵojn de la prezidantedzinaj brakoj. Tio estis ĝenerale konata, kaj la popollingva kreado eknomis pendemajn trodikaĵojn de brakoj laŭ Alli.

Kial rakonti tiajn anekdotaĵojn, kiel tiuj rilatas kun nia afero? Esence. En la senfina fenomenaro de nia mondo intereso ne egale dividiĝas. Entute, grandajn amasojn interesas, movas, aferoj kiujn sperti kaj senti proksimaj – sporto kaj sportistoj, propra estado kaj bonfarto, identiĝo kun io komprenebla kaj akceptebla. Aferoj kiel interlingva problemaro aŭ funda kono kaj kompreno de historio estas malfacilaj, kaj sekve estas pli granda movo tiujn proksimiĝi. Nia defio kiel esperantistoj estas krei tian Esperantujon, kiu movas proksimajn interesojn de homoj. Socia prestiĝo ĉe elektitaj elitoj gravas, sed ne sufiĉas.

Tuomo Grundström

Reordigoj gvidas nin el naciaj ŝtatoj al mondskalaj ideoj



Unu el la aferoj, kiujn amaskomunikilaj novaĵelsendoj en Finnlando ĉi tiun semajnon elstare traktis, estis reordigo de aviadilaj terminaloj en la flughaveno de Helsinki. Nun oni ne plu dividas la flugojn en hejmlandajn kaj internaciajn. Estas nur propra sekcio por ĉiu firmao, neniel rolas ĉu la flugoj iras al finna aŭ eksterlanda loko.

La ŝanĝo estas principe bagatela, sed tre karakteriza por nia erao: pli kaj pli okazas, ke divido de aferoj laŭ limoj de ŝtatoj perdas sian signifon. Se ni kutimis konsideri, ke Nokia estas finna firmao kaj Ericsson estas sveda firmao, tio nun validas nur ĝis iu nivelo, ĉar Nokia havas fabrikojn en multaj landoj kaj el ĝiaj dungitoj plejparto estas en aliaj landoj. Kaj same pri Ericsson, kiu cetere jam kuniĝis kun japana Sony. Kaj se ni pensas, ke Helkama estas finna biciklo kaj Crescent estas sveda biciklo, ankaŭ tio estas ne plu tiom simple. Se biciklo ankoraŭ venas el la finna fabriko de Helkama, ĝi havas nur limigitan kvanton da finna materialo, ĉar la biciklopartoj, el kiuj tiu firmao konstruas biciklojn, ĉiukaze venas el la monda merkato – kaj estas multe la samaj komponentoj, kiujn la sveda fabriko de Crescent uzas por siaj bicikloj.

Tiu evoluo plej draste videblas en la sferoj de komercaj firmaoj. Malpli klare tiun direkton sekvis administraj strukturoj kaj neregistaraj organizoj. La Eŭropa Unio estas ambicia provo formi tian administran strukturon, kiu ne baziĝas sur rigida koncepto de naciaj ŝtatoj. Sen problemoj tia formaĵo ne tamen naskiĝas. Kiam oni malaltigas la limojn en la unio, ekzemple forigas kontroladon de pasportoj kaj malpliigas doganojn ĉe la limoj, estas daŭra minaco, ke la unio en sia tuto konstruas eĉ pli altajn barojn kontraŭ la ekstero. La evoluo en tiu formo favoras ĉefe la centrajn regionojn de la unio, dum la

regionoj ĉe la limoj de la unio iĝas periferiaj. Funkcianta modelo, kiel najbaraj urboj ekzemple de orienta Finnlando kaj nordokcidenta Rusio povus forigi barojn de burokratio por sia kunlaboro kaj kunvivo, kiam unu estas en EU kaj la alia ekster ĝi, restas por inventi.

Organizoj en sia teoria strukturo ne multe sekvis la tutmondiĝan evoluon. Same kiel antaŭe ni havas Esperanto-Asocion de Finnlando, kiu celas havi membrojn en Finnlando nur, kaj en ĉiu najbara lando estas propra landa asocio. Praktike tamen la interreto iom ŝanĝis la situacion. Funkciado de organizoj pli kaj pli koncentriĝas en la reton anstataŭ tradiciaj gazetoj kaj kunvenoj, kaj en la reto ne estas grave, kie la uzanto sidas. Ni vidas ekzemple, ke retroŝtlisto EAF-agadas, kvankam celata por finnoj kaj finnaj aferoj, havas plurajn membrojn el eksterlande, kaj ĉiuj povas egale bone partopreni la diskutojn tie.

Bona ekzemplo pri nova organiza tipo estas la Biciklista Esperanta Movado Internacia, BEMI, kiu havas preskaŭ nenan organizan strukturon krom la retroŝtliston. Tie oni tute ne devas konsideri, kiu loĝas en kiu lando. Sufiĉas nur diskuti pri kiu volas bicikli kiuloke, kaj ĉiuj, kiuj volas bicikli kune, povas tiel konsenti pri renkontiĝo.

Restas por vidi, ĉu ni en estonteco iel ajn bezonos organizojn ligitajn al iu per limoj difinita regiono, aŭ ĉu ni formas niajn ligojn per nur ideoj transirantaj en tutmonda reto. Por nun EAF nature daŭrigas agadon laŭ siaj tradicioj.

Mikko Mäkitalo

La 10a kurso en Valamo – jubilea atmosfero kun kreksa kantado

La ĉi-jara kurso estis la 10a sinsekva kaj nomita jubilea. Ĝin partoprenis 16 gelernantoj, el kiuj ĉirkaŭ la duono estis unuafaj vizitantoj en la kurso kaj en la monaĥeja areo. Ili studis en du grupoj, ambaŭ instruitaj de Atilio Orellana Rojas kaj Patrik Austin. Ĉi-jare mi povis koncentriĝi en la taskoj de la kursogvidanto. Jukka Laaksonen denove ĉiĉeronis la kursanojn tra la monaĥeja areo kaj kunestis en niaj vesperaj aranĝoj.

En la elementa grupo estis 4 kursanoj, kiuj ĉiuj havis la plej bazajn sciojn kaj tiel povis rapide progresi. Ĉiuj estis interesitaj ankaŭ pri la diversaj Esperanto-aranĝoj kaj en la hejmlando

kaj ekster ĝi.

En daŭriga grupo la kursanoj konversaciis, prezentis resumojn de gazetaraj tekstoj, enprofundiĝis en gramatikaj problemoj kaj kompreneble faris aliajn aferojn sub gvido de lertaj instruistoj. El ekster Finnlando ni havis du virinojn Katja el Peterburgo/Rusio kaj ankaŭ rusdevena Irina, kiu nuntempe loĝas en Hispanio. Ambaŭ rakontis al ni pri iliaj spertoj kiel esperantistoj kaj montris fotojn.

Jam lunde ni ĝojis aŭdante la voĉon de malnova amiko: la birdeto kreksa kantis en sia knarada maniero vespere en la natursovaĝa kampo. En nia interkona vespero ni tuj rakontis pri la



birdo al ĉiuj por ke ili povu mem konstati ĝian ekziston. Dankon al Sylvia, kiu komencis tiun tradicion jam dum la tria kurso. La kanto Nokturno ankaŭ apartenas al la Valamo-semajno, ĝin oni aŭkultis dum la festa vespero jaŭde.

Merkrede posttagmeze estis neofta aranĝo de la monaĥeja flanko, kiun ĉiuj povis libere sekvi: Post procesio al la monaĥeja tombejo okazis tie eta benado de la akvo de la monaĥejaj pastroj. Post la aranĝo ni bonege povis viziti la tombejon, kiu enhavas multajn interesajn rakontojn kaj memorojn de la pasinteco.

Merkrede dum nia vespera kunestado estis tempo pensi pri la pasintaj 10 jaroj. Ni kunhavis fotojn, gazetarajn eltondaĵojn kaj programojn kun partoprenantlistoj de ĉiuj kursoj. Jukka Laaksonen rakontis de kie venis la ideo havi la somerajn Esperanto-kursojn kunlabore kun la Popola Instituto de Valamo. Dum la jaroj okazis kaj amuzaj kaj kelkajre eĉ fatalaj eventoj: dum kelkaj kursoj ĉeestis tiel malmulte da kursanoj ke la daŭrigo preskaŭ estis minacata. De ĉiu kurso tamen foriris kontentaj partoprenantoj kaj ni sukcesis daŭrigi la kunlaboron kun la Instituto.

Neniu ĉeestis ĉiujn 10 kursosemajnojn: Atilio devis unufoje foresti pro malsano kaj mi mem ne partoprenis la unuan kurson, kies kursogvidanto estis Seija Kettunen. Eĉ Jukka forestis de Valamo kelkfoje, kiam estis la kursosemajno.

La tradicia teatraĵeto de kurso okazis merkrede kaj estis denove amuzega. Kaj kompreneble ni kunkantis kaj Patrik kaj mi ludis niajn instrumentojn. Laste oni dancis La Bamban en internacia maniero – la kompatinda Patrik devis ludi kaj kanti ĝin multege da fojoj antaŭ ol la dancantoj laciĝis.

Jaŭde posttagmeze nin vizitis Harri Laine, kiu kunmarŝis al la kruco de la migranto kaj fotis la grupon tie – eĉ multfoje, ĉar preskaŭ ĉiuj kunhavis fotilojn. Dum la 2-hora migrado oni belege vidas multajn tipojn de la finna arbaro: parto estas marĉo, en alia parto kreskas multege sovaĝaj floroj kaj herboj. Dumvoje oni vidas ankaŭ la ĉefajn arbojn: betulojn, pinojn kaj piceojn. Post kafopaŭzo ĉe la kruco estas ĉiam afable piediri hejmen al la monaĥeja centro.

Antaŭ la festa vespero jaŭde la kursanoj kun la instruistoj kaj la kursogvidanto kolektiĝis por komuna fotado apud la centra placo de la monaĥejo. Dum la festa vespermanĝo la atmosfero en la imperiestra salono estis gaja kaj diskutado okazis same flue esperante kiel en la finna. Oni ankaŭ kunkantis kaj aŭskultis muzikadon.

Vendrede antaŭ ol okazis la adiaŭaj vortoj, ni havis la plezuron aŭdi pri Esperanto-muzeo en Vieno. Kursanoj Jukka kaj Eeva Nikoskelainen vizitis ĝin printempe ĉi-jare kaj nun Jukka lerte rakontis esperante kaj finne pri la vidindaĵoj de

Turisma parto de retpaĝoj de komunumo Heinävesi esperante

La monaĥeja komunumo Heinävesi prezentas la turismajn aferojn nuntempe ankaŭ en Esperanto en siaj retpaĝoj dank’ al kunlaboro kun la urba turisma oficejo kaj ĝia ĉefo Leena Vlasoff. Jukka Laaksonen tradukis la tekstojn. Klaku al www.heinavesi.fi kaj vi trovos la konatan flagon sub la finna flago.

Heinäveden kunnan nähtävyyksistä nettisivuilla myös esperantoksi

Heinäveden kunnan nettisivut esittelevät kunnan nähtävyyksiä ja muita yleisiä asioita nykyään myös esperantoksi. Käännökset on tehnyt Jukka Laaksonen. Kiitos yhteistyöstä Heinäveden kunnan matkailutoimistolle ja matkailupäällikkö Leena Vlasoffille. Katso www.heinavesi.fi ja löydät tutun lipun sivun ylälaudasta.

Tiina Oittinen

la muzeo kaj montris fotojn. Ekestis vigla parolado kun multaj demandoj de la kursanoj.

Kiel memoro de la jubilea kurso EAF donacis al la kursanoj la finnan epopeon Kalevala. Al la Popola Instituto de Valamo la epopeo estas donacita jam antaŭ jaroj same kiel la esperanto-finna-esperanto vortaro, PIV kaj kelkaj lernolibroj. Ĉi-jare la rektoro Sirpa Koriala akceptis la novan finnlingvan version de DVD Esperanto estas (finne *Esperanto on?*). La rektoro dankis nin ĉiujn kaj bonvenigis nin denove partopreni la venontjaran kurson. La kurso okazos denove en la semajno post la mezsomera festo, kiu venontjare estos 28.6.–2.7.2010. Bonvenon tiam! Vin atendas la instruista kaj aranĝanta teamo Atilio, Patrik kaj Tiina.

Tiina Oittinen

Rekomendas Valamo-kurson

Lastjare post la kurso en Valamo mi diris al Atilio (en la germana lingvo!), ke venontjare mi lernos paroli Esperante. Tiam mi jam komprenis ĉion, kion ekz. la pola virino rakontis dum la prelego en vendredo. Al la ĉi-jara kurso mi aliĝis jam en printempo kaj legis multajn Etekstojn antaŭ la kurso.

Nun ni loĝis en la altlerneja hotelo, kie estis tre trankvile. Pleje mi ĝuis iri por manĝi en la restoracio Trapesa, mi ne bezonis mem kuiri kaj baki. La instruistoj Atilio kaj Patrik estas kompetentaj kaj ni eĉ havis "hejmtaskojn" por sekvaj tagoj. Ĉiu tago havis sufiĉe da programo, kvankam ĝi estis parte sama kiel lastsomere. La vetero favoris la kursotempon, la pluveto ne ĝenis nin. Inter la kursanoj mi konis kelkajn jam antaŭe. Estis facile uzi Esperanton dum lecionoj, mi trovis vortojn, mi ne plu bezonis silenti Esperante.

Dum manĝado ne ĉiam estis same facile paroli nur Esperante, sed eĉ kun Irina mi kuraĝiĝis paroli. Osmo kelkfoje riproĉis min pro la finna lingvo, sed iom post iom mi kutimiĝos al paroli

Esperante. Ĝis nun mi ne ofte havis okazon. Miajn atendojn la kurso superis. Tiina persvadis mian edzon Lasse ĉi-somere partopreni en la komencantogrupo kaj nun li komprenas iom da Esperanto.

Elkoran dankon al EAF! En vendredo la kursanoj surprize ricevis pro la "dekjara jubilea kurso" esperantlingvan libron Kalevala, tio estas bona, valora memoraĵo. En la libroservo mi aĉetis tri librojn kaj en la somerbutiko Lafka mi trovis eĉ libron en Esperanto. Nun mi havas hejme multe da legi. Interesa estis informo pri la rara birdo krekso (ruisrääckkä). Poste ankaŭ mi zorgeme aŭskultis apud la florerbejo, ĉu la krekso "kantus". Kaj tio sukcesis, mi aŭdis la krekson kraki plurfoje, ankoraŭ en la lasta mateno por adiaŭi min.

Mi rekomendas Valamo-kurson al ĉiu, kiu volas travivi semajnon en bela trankviliga ĉirkaŭaĵo kaj plibonigi sian Esperanto-scion.

Marjatta Ström

Bona etoso en jubilea Valamo

La somera kurso ĉi-jare estis la deka en Valamo kaj do jubilea kurso. Mi tre ĝojas ke mi finfine sukcesis partopreni. Nun poste mi komprenas kial tiel multaj el vi jam plurfoje venis tie. La etoso estis tiom bona, la loko belega kaj evidente la mastroj de la monaĥejo ne malŝatas la ideon de Esperanto, ĉar ili dum tiel longa tempo bonvenigis la kurson.

Mia speciala danko al vi instruistoj Atilio kaj Patrik pro via sindono kaj pacienco. Lertaj instruistoj estas la bazo de kurso. Mia forgesita lingvo vere refreŝiĝis. Kaj ankaŭ dankon al Tiina pro lerta aranĝado kun energio, inĝenio kaj eĉ muziko por nia bono kaj ĝojo.

Kaj estis ankaŭ agrabla sperto por mi konaĵi kun ĉiuj aliaj kursanoj. Ĉu eble ni revidos venontjare?

Heljä Favén

50-jariĝo de Balt(i)aj Esperanto-Tagoj

Dum 8a ĝis 12a de julio 2009 en la estona urbeto Paikuse apud Pärnu okazis la 45-a BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj). En tiu jubilea aranĝo partoprenis el 9 landoj preskaŭ 100 personoj – inter ili 6 el Finnlando, kaj hungarino, kiu turneos ankaŭ tra Finnlando.

Jubilea BET estas pro la 45-a fojo de ĝia okazo laŭvice en la baltaj landoj Litovio, Estonio kaj Latvio, kie ĝi debutis ĉe lago Baltezers antaŭ nun 50 jaroj, iniciita de Biruta Rozenfelde el Rigo.

Ĉi-foje tre taŭga kunveno estis kolegio de la estona policakademio – apenaŭ troveblas “pli sekura loko” por Esperantoaranĝo. Programeroj kaj loĝado okazis kune en la ĵus renovigita domo, tiel ekestis tre familia etoso kaj facila komforto.

Kulturo estis bone reprezentita dum la aranĝo: varia muzika programo (inter alie loka virina koruso, tre konata folkloro grupo Seljanka kaj pola korusa ensemblo), vizito en apuda vilaĝa muzeo, sub gvido de familio Aitai ekskurso al la apuda urbo Pärnu – kie ni eĉ povis ĝui provlundon de klasika muziko en la malnova urbodomo – garantiis interesajn impresojn al la publiko.

Eĉ okazis laŭ instigo de Madis Linnamägi plia eldono de la konkurso Kannel, kiu en soveta tempo servis al instiga komparado de diversregionaj grupoj kaj unuopuloj. En la fako kantado la unuan lokon gajnis la latva knabina grupo Animo, dum la unuan lokon en deklamado rikoltis Tuomo Grundström.

Unua loko en la kvizo.

Somera vetero dorlotis la partoprenantojn dum la tuta tempo, ĉu dum la rigardo de la proksima urbo Pärnu, ĉu dum la ekskurso al la Balta maro, proksime de la latva landlimo, al pado tra marĉo kun rigardturo Rannametsä resp. Häädemeeste, kaj la birdokalkula stacio Kabli.

Ĉefa programero estis la Somera Universitato, kun kolekto de variaj prelegoj kaj prezentoj – de homa sano tra la signifo por kantofestoj al la estona lingvo kaj nacio ĝis ampleksa prezento de bildoj el Brazilo. Ni konatiĝis kun finn-estona literaturo de aŭtoroj kiel Aino Kallas, Hella Wuolijoki kaj Sofi Oksanen. Plie Peeter Aitai informis pri sia Esperanto-agado en sociaj retoj; kvizo finfine vigligis iom la cerbojn kaj donis pralinojn al la gajninta triopo.

Ankaŭ kurso por komencantoj okazis, tiel kelkaj komencintoj povis pliprofundigi en la lingvon.

Kulmino de la jubilea BET estis la granda



balo, kiam loka muziko instigis la partoprenantojn al dancado. Ni festis naskiĝtagrevenon de Irina Aitai, kaj ĝuis la abundajn kaj bongustajn manĝojn, tostis per vino kaj pecoj de giganta torto. En loterio eblis gajni ekzemplerojn de la sufiĉe ampleksa libroservo.

Kiel ĉiam eblis renkontiĝi kun amikoj kaj konatiĝi kun novaj najbaroj el Baltio, en tre tradicia kunveno. Certe por ĉiu estis plia agrabla renkontiĝo en la kadro de BET, kiu formis amikecojn nun dum duona jarcento. BET bone plenumas la rolon interligi esperantistojn kaj amikojn el baltaj landoj, inter “okcidento” kaj Rusio ĉirkaŭ la Balta maro. Kiu ankoraŭ ne konatiĝis kun tiu mezgranda aranĝo, havos la eblecon sekvontjare en Litovio, kvankam la loko ankoraŭ ne fiksiĝis. Ĝis la zamenhoffesto decembre certe venos decido.

Kunorganizanto Peeter Aitai (pernuano loĝanta nun en Britio) metis grandan kolekton da videoklipetoj en sian paĝon ĉe Jutubo: <http://youtube.com/peeteraitai/>

Bildoj troveblas ĉe <http://www.ipernity.com/doc/brilanto/album/137566> (Robert Bogenschneider), Paulo Branco (<http://xurb.freehostia.com/712/index.html>)

Robert Bogenschneider



Biruta, fondinto de BET el Latvio.

Folkensemblo "Seljanka".



En Kaustinen kun japanino

Turneis en Finnlando dum du juliaj semajnoj s-ino OSIOKA Taeko vizitante okon da urbetoj kaj renkontante dekojn da finnaj esperantistoj. Ĉar ŝia vizito koincidis kun la popolmuzika festivalo Kaustinen, ni kune profitis. Belega estis la vetero vespere la 15an de julio, kiam ni eniris la festoterenon. Buntaj flagoj de diversaj landoj flirtis sur altaj stangoj kontraŭ bluega ĉielo. Bonhumoraj homoj en somera vesto iradis de unuj muzikejoj al aliaj, de glaciaĵobudoj al kolbasetbudoj, de kafejetoj al bierejoj, vinkelo kaj necesejoj, haltadante por aŭskulti jen violonistojn, jen akordionistojn, jen por rigardi naciajn kostumojn de dancistoj prezentantaj siajn belajojn, ĉiu grupeto ĉirkaŭata de pli malpli granda kunkantema kaj dancema spektantaro. Infanoj ludis en bone ekipita ludparko aŭ de-segnis kaj muzikis eĉ konkurse en sia tendego.

Sub la plej granda pinta toltegmento striita flave kaj brune okazis abunda koncerto de polaj, ĉinaj kaj kroataj artistoj, enkondukite de lokaj amatoraj gejunuloj, kiuj prezentis modernigitajn kareliajn dancojn ruse spicatajn. (Ĉi somere inter ili dancas kroata ŝanĝlernanto, kiu en

2008–2009 studis en la muzika lernejo de Kaustinen, tre kontenta pri sia lernoĵaro.) La ĉinaj artistoj, premiitaj en konkurso de ĉina televido, kantis kaj muzikis en manieroj, kiuj interesis nian japanan gastinon. Ŝi diris, ke antaŭe ŝi neniam aŭdis tiaĵojn; ŝi devis veni al Finnlando por sperti tion. Multaj aliaj spektantoj montris sian entuziasmon per ritma manklakado, kuraĝigaj krioj kaj aplaŭdoj. La polaj muzikistoj prezentis klezmeran, karpatian kaj ciganan muzikon. La plej grandan parton de la koncerto okupis kroata 100-jara ensemblo Zeljesnicar ("fervoĵisto") el Zagrebo: bele broditaj kostumoj kaj kaptukoj, ruĝo, bluo, blanko, flavo, brilaĵoj, nigraj botoj kaj peltoĉapoj, supraj senbruaĵ ledŝuetoj, lertaj piedoj; granda orkestro ludanta surpodie kaj la ambasadaro de Kroatio unuavice sur la benko de spektantoj.

Revenante aŭte al Lestijärvi s-ino Osioka kaj s-ro Pyhälä prezentis ampleksan repertuaron de plurlingvaj kanzonoj kaj kantoj. Do, la koncerto daŭris plian horon. Noktomeze ni saŭnis kaj teumis; en julio eĉ nokte ne mallumas.

Saliko



*Ĉina ensemblo
Shangri-la
dancanta. ▷*

*Taeko Osioka ĉe Saliko.
Ŝi ŝatas desegni kaj pentri.*

Jam la dekdua raportaro!

*HORI Jasuo. Raportoj el Japanio 12.
Eldonejo Horizonte. Paĝoj 187. Prezo 14 e.*

En sia plej nova raportaro aŭtoro HORI pli malkaŝe ol en la dekonu antaŭaj raportaroj esprimas siajn sentojn kaj opiniojn pri la japanaj aferoj kaj novaĵoj, kiujn ili traktas. Ĝisfunde li konatiĝis kun siaj fontoj. La libro enhavas statistikajn tabelojn kaj diagramojn. Ĉiu raportaro montras historieton kaj mapon de Japanio kaj informojn pri la verkisto, estrarano de UEA. La lingvo estas facile legebla, apenaŭ troveblas eraro post zorgema kontrollegado de du alilingvanoj. Nigra-blankaj klaraj fotoj laŭbezone kompletigas la tekstojn, sed kiam temas pri mang'ajoj (gjoza, ohagi), aldone al la vorta kaj fota priskribo, oni devus reale gustumi ilin por kompreni. Do, ni vizitadu Japanion!

La temoj de la raportoj estas variaj: ne nur fak-tecaj, aferecaj sed ankaŭ amuzaj (mezuriloj de ridoj), kortuŝaj (muzeo por montri la pentraĵojn de junaj artistoj milite mortintaj). Kelkajn el la problemoj traktataj de Hori ni konas ankaŭ en Finnlando (mankon de kuracistoj, flegistoj kaj prizorgistoj de maljunularo; senlaborecon; ŝajne sensencan perforton inter junularo; agadon kontraŭ fumado k.a.) Kelkaj raportoj estas pli ekskluzive lialandaj (japanaj politikaĵoj; reapero de birdoj preskaŭ formortintaj, specifaj artaj eventoj). Sinjoro HORI atenteme observas, kio okazas en lia lando, kaj lia koro saĝe juĝas ĉion travivatan kaj privilegatan.

Saliko



Arvo Karvinen gvidas la estraron de LIBE

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) elektis novan 7-membran estraron por la jaroj 2009–2013. La elekto okazis en la kongreso de LIBE 18.–25.7. en Muszyna, suda Pollando. Kongreson partoprenis 95 esperantistoj el 16 landoj.

Arvo Karvinen elektiĝis kiel prezidanto. La ĝenerala sekretario estas Dragan Štoković el Kroatio kaj vicprezidanto Nedeljka Lozajić el Serbio. Kiel dua sekretario daŭrigas Anatolij Masenko el Rusio, kaj kiel kasisto Pier Luigi Da Costa el Italio. Aliaj estraranoj estas Natalia Kasymova el Germanio kaj Vladimir Ĵelev el Bulgario.

LIBE celas progresigi inter blinduloj esperanton kaj internacian kunlaboron sur la kultura kampo. La revuo Esperanta Ligilo aperas ĉiunmonate brajle kaj rete. LIBE-anoj abonas ankaŭ aliajn esperanto-publikaĵojn.

La ĉefaj kampoj de la venonta kvarjara agadperiodo estas edukado, junularaj renkontiĝoj, informado kaj ekonomio, se eble ekologia.

Ritva Sabelli

Jarlibro 2009 aperis

Portreto de D-ro Zamenhof malfermas la ĉi-jaran Jarlibron de UEA omaĝe al lia 150-a datreveno. En la antaŭparolo Barbara Pietrzak, la ĝenerala sekretario de UEA, traktas la aktual-econ de la ideoj de Zamenhof kaj tiujn de la Manifesto de Prago, kies teksto aperas apud la Esperanto-rezolucioj de Unesko. Kun 1735 adresoj en 102 landoj la Jarlibro havas precize same multe da delegitoj kiel en 2008.

Ankaŭ funkcias reta jarlibro. Por ekuzi necesas registriĝi ĉe <http://reto.uea.org>. Fine de majo tiu ĉi servo, enkondukita en aprilo 2005, havis 2120 uzantojn.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Debuto de novtipaj ekzamenoj

Dum la 94-a Universala Kongreso en Bjalistoko okazis, unuafoje kadre de UK, Esperanto-ekzamenoj laŭ la nova ekzamensistemo de UEA, konforma al la Eŭropa Referenckadro. Pli frue jam kvardeko da esperantistoj ricevis diplomon laŭ tiu sistemo de la Konsilio de Eŭropo, kies Esperanto-version oficiale UEA sola provizas pere de sia kontrakto kun la Lingvoekzamena Centro (ITK) de la prestiĝa universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. En Bjalistoko ekzameniĝis je tri niveloj entute 47 personoj el 20 landoj. La sekvaj ŝancoj por ekzameniĝi laŭ la Referenckadro estos dum ARKONES en Poznano (18–20 septembro) kaj dum la tradiciaj jarfinaj aranĝoj en Germanio. Interesitoj bv. kontakti Katalin Kováts, katalin@ikso.net.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Propono de UEA al kvar gvidantoj

La 16-an de junio okazis en la rusa urbo Jekaterinburgo la unua pintkunveno de Brazilo, Rusio, Hinda Unio kaj Ĉinio. Tiuj kvar landoj intencas kunlabori pli intense kaj elpaŝi kune en la monda politiko. En Jekaterinburgo, kie la ĉefa temo estis la nuna ekonomia krizo de la mondo, renkontiĝis la ŝtatestroj Dmitrij Medvedev el Rusio, Luiz Inacio Lula da Silva el Brazilo kaj Hu Jintao el Ĉinio, kaj la barata ĉefministro Manmohan Singh.

Post la kunveno la prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta, skribis al la kvar gvidantoj, karakterizante la eventon kiel historian, kaj enkondukis proponon:

“Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj

privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne.””Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli koston solvon.”

La letero de prof. Dasgupta estis sendita al ĉiu ricevanto en ties propra lingvo.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

Altnivela akcepto ĉe Unesko

Tripersona delegitaro de UEA estis tre varme akceptita en Unesko lundon, la 8-an de junio. Ĝi konsistis el la konstantaj Unesko-reprezentantoj de UEA Barbara Despines kaj François Lo Jacomo kaj el eksprezidanto Renato Corsetti. Antaŭ la vizito prezidanto Probal Dasgupta sendis al Unesko detalan raporton pri la kontribuo de UEA al la Internacia Jaro de Lingvoj en 2008. La temaro de la Jaro estis multmaniere pritraktata en UEA kaj ĝiaj landaj asocioj. La plej pintaj kulminoj en tio estis la 93-a UK en Roterdamo en julio, kies kongresa temo kombinis la Jaron de Lingvoj kun la 100-jariĝo de UEA, kaj la konferenco en la Pariza sidejo de Unesko en decembro, kiu samtempe fermis la Jaron de Lingvoj kaj malfermis la Zamenhof-jaron.

La delegitaro de UEA estis akceptita de la programspecialisto Mauro Rosi kaj s-ino Françoise Rivière, asista ĝenerala direktoro pri kulturo. La reprezentantoj de UEA prezentis proponon, ke la Jaro de Lingvoj ricevu daŭrigon en formo de Internacia Jardeko de Lingvoj. La asista ĝenerala direktorino trovis la ideon tre interesa, ne laste pro tio, ke laŭ ŝi la Kultura Fakto de Unesko estas nun pli ol antaŭe premata por agi

favore al lingvoj. En Unesko pri deklaro de temaj jaroj kaj jardekoj kompetentas la Ĝenerala Konferenco, al kiu necesos silenta diplomatio kaj premagado por akiri la subtenon de sufiĉa nombro da ŝtatoj.

(el komuniko de UEA koncizigis mm)

TEJO ricevis novan estraron

